

LA BRITA KONSILIO DONAS ANTAŬRAJTON AL PEKINO.

La "British Council" esperas plivastigi sian aktivadon en Ĉinio en la 1980-aj jaroj kie nuntempe troviĝas la plej granda ekspansiigebla merkato por la angla lingvo, laŭ Sir Charles Troughton, Prezidento de la Brita Konsilio.

Sir Charles, kiu nuntempe vizitas Ĉinion, diras, ke ĝi estas la unusola parto de la buĝeto de la Konsilio ne reduktita ĉijare. Li aldonas, ke la disvastigo de la angla lingvo, kune kun la interŝanĝado de studentoj, estas la ŝlosila ero en ĝia programo.

La britaj civitanoj, ĉu profesiuloj, ĉu laboristoj, subvencias per impostoj la popularigon de sia lingvo en fremdaj landoj por ke ĝi fariĝu fine la sola fakta internacia lingvo. Eĉ la anglalingvanoj ne estas ĉiam tiel arogantaj, ke ili volas trudi sian lingvon al alilandanoj!

La Brita Konsilio kaj ĝia frata propagandinstanco, la BBC, bone konstatas, ke, se ili sukcesos en Ĉinio, la angla lingvo fariĝos tiel potenca, ke baldaŭ ĉiuj fremdaj popoloj estos devigataj lerni la lingvon. Krome, tiuj instancoj esperas, ke baldaŭ la anglalingvanoj mem ĝuos la avantaĝon neniam denove devi lerni fremdan lingvon!

La usonanoj jam planas lanĉon de paralela kampanjo por sia dialekto de la sama lingvo.

Ni devas fidi al niaj ĉinaj amikoj, ke ili ne permesos tiun lingvan imperiismon, malgraŭ la fakto, ke ĝin remburas la multmilionoj de riĉaj registaroj!

ESPERANTO PROPONAS LA MANON DE AMIKECO. NECESAS FORTA REAGO FARE DE ESPERANTISTOJ: SKRIBU AMASE AL ĈINA ESPERANTO LIGO, PEKINA RADIO KAJ AL LA REGISTARO DE ĈINA POPOLA RESPUBLIKO, AVERTANTE PRI TIU INSIDA IMPERIALISMO!

++++++

Tiun ĉi cirkuleron elsendis Esperanto-Centro, Hillingdon, Anglujo, al Esperantaj Organizaĵoj kaj gazetoj. Ĉu ne estos je niaj propraj interesoj sekvi la sugestojn indikitajn?

++++++

LA SUDAFRIKA ESPERANTO-ASOCIO

P. O. BOX 1227; Cape Town.

- PREZIDENTO: s-ro E. de Kock.  
VIC-PREZIDENTO: s-ro A. von Blottnitz.  
SEKRETARIO: s-ro O. Sher.  
KASISTO: s-ro C.S. Beckford.  
KOMITATANOJ: s-ino A. Fouché; s-roj H.W. Appel,  
J. van D. Strydom; F.M. Woolf.

ENHAVO

Brita Konsilio donas Antaŭrajton	1
Estraro	2
Speciala Avizo pri Jarkunveno	3
Kontraŭ la EK-Babelo.	4
Komuniko de la Akademio	5
Rememoroj de la Namibo, II	6
Biografieto de s-ro Appel	7
Trilingva )	8
Artikolo )	9
Eĉ Tio Okazis	10
Johannesburgaj Okazintaĵoj	11
Zamenhofa Ligilo kun Sudafriko?	12
Iom pri Energio	13
Esperantista Adresaro	14
Sovaĝaj Korespondpetoj	15
El Nia Gramatiko	16

XXXXXXXX

Redaktoro: F.M. Woolf, Box 18, SEA POINT. 8060.  
Tel: 44.2657; helpe de s-ro C.S. Beckford; tel:  
22.6326; hejme: 77.0588).

XXXXXXXX

LA JARKUNVENO DE LA ASOCIO okazos dimanĉon, la 29an de marto, 1981 ĉe s-ro H.W. Appel, 8, St. Michael's Rd., New Redruth, 1450 Alberton, Tvl. (Tel. (011) 869.4031).

TAGORDO de la 17a Jarkunveno:

1. Antaŭa protokolo kaj traktado de aferoj estiĝantaj el ĝi.
2. Raporto de la Prezidanto.
3. Raporto de la Sekretario kaj pritraktado de korespondaĵoj.
4. Raporto de la Kasisto.
5. Elekto de nova estraro.
6. Aliaj aferoj.

Mi petas, ke oni sendu al mi, kiel eble plej frue, nomojn de membroj, kiujn oni deziras proponi por elekto al la nova komitato/estraro, kun ilia konsento agi se elektitaj. La nunaj komitatanoj estas petataj informi min ĉu aŭ ne ili konsentas al refoja elekto por plua jaro.

Membroj, kiuj ne povas ĉeesti la kunvenon, estas petataj ensendi siajn komentojn, opiniojn, ktp., al mi, por ke oni povu pritrakti ilin sub la ĉi-supra ero 3. Mi aparte deziras ricevi raportojn pri Esperanto-agado de ĈIUJ grupoj en la lando.

O. Sher; sekretario.

TUTMONDA ESPERANTISTA ADRESARO: Se vi volas, ke via adreso aperu en TEA, vi estas petata plenigi respondilon kaj resendi ĝin al Info-Servo en F.R. Germanio. La adresaperigo kostos NENIOM por vi. La respondilo estas akirebla ĉe la sekretario. Bonvolu informi viajn esperantistajn amikojn pri TEA. Ĉiu Esperantisto, ĉiuj Esperantistaj asocioj, societoj, entreprenoj, ktp., aperigu siajn adresojn en TEA.

+++++

(Vidu sur paĝo 14a por pluaj detaloj kaj informoj ege interesaj pri la ĉi-supre menciita adresaro. Ĝi ja meritas la seriozan atenton de ĉiu Esperantisto).

## KONTRAŬ LA EŬROPA KOMUNUMO-BABELO!

Dum la gazetaro antaŭ nur malmultaj jaroj tute ignoris kaj neis ian lingvan problemon en Eŭropa Komunumo, aperis nun en multaj gazetoj speciala Associated Press informo: S-ino Renee van Hoof, direktoro de la interpretista servo de la EK-instancoj, parolas pri minacanta "funkcia paralizo" de la interpretado, kiam dum 1981 Grekujo kaj poste Hispanujo kaj Portugalujo membrigos en Eŭropa Komunumo. Sia solvo: Oni interpretu ekde tiam nur en la 'plej oftajn' lingvojn; kaj rimarkinde ŝi mem aldonas, ke tiukaze "la angla povus gajni superantan signifon".

Cu "EK-babelo aŭ lingva diskriminacio" estas neevitebla alternativo? Esperantistoj tuj respondas per decida "ne!"; se ĉiuj parolas Esperanton, ne plu ekzistas malfaciloj interkompreniĝi kaj lingva subpremo.

Sed ĉi-foje la problemo ne estas tiel simpla. En la Eŭropa parlamento ĉiuj lingvoj devas esti hejmaj. Ĉiu parlamentano devas havi la rajton prezenti siajn ideojn en sia gepatra lingvo, ankaŭ en la kataluna, la bretona aŭ iu alia minoritata lingvo. Tio signifas, ke interpretistoj ne estas superfluigeblaj.

Sed la nombro de ili estas ege malgrandigebla, eĉ obeante la principon de samrajto de ĉiuj lingvoj, nome per tio, ke oni ĉion ajn tradukas nur en Esperanton. Tiun okulfrape trafan proponon prezentas pastro Ludwig Thalmajer, Landshut, Germanujo, dum prediko. Prave li substrekis, ke nur tiel oni povas samrajtigi la "pli malgrandajn" lingvojn.

De la parlamentanoj oni nur postulas pasivajn konojn de Esperanto, premiso, kiun ĉiu inteligenta homo povas plenumi post malmultaj semajnoj. Krome restas la stimulo lerni pliajn fremdajn lingvojn (kaj ne nur la anglan kaj la francan!) por kompreni la originalan parolon. Plie oni povas malplioftigi interpretajn erarojn.

Por la tuta interpretista servo sufiĉos ununura tradukkanalo. Eĉ, kiam gasto prelegas en lingvo, kiu ne hejmas en EK, ne ekestas problemo se la preleganto kunirigis interpretiston, kiu tradukas lian lingvon en Esperanton. Kara leganto, vi povas skribi vian opinion al la aŭtoro kaj prezentu tiun solvon al via parlamentano. Ni estas aŭdeblaj, nur se ni levas la voĉojn.

Adreso: D-ro Rudolf Fischer, Gustav-Adolf Strasse 2a,  
D-4401 Nordwalde, F.R. Germanio.

La Akademio de Esperanto notas kun forta malaprobo diversajn proponojn, inter si malsimilajn, ŝanĝi aŭ modifi la ortografion de Esperanto.

La Akademio konstatas, ke neniuj ortografia ŝanĝo estas necesa aŭ dezirinda, aŭ en ligo kun modernaj presmaŝinoj aŭ komputmaŝinoj, por kiuj ĝia ortografio estas tiel same oportuna kiel la ortografioj de aliaj lingvoj, aŭ pro ia ajn alia motivo.

La ortografio de Esperanto estas integra parto de la historio kaj kulturo de tiu lingvo, kaj konformiĝas perfekte al la karaktero de la lingvo. Iu ajn ortografia ŝanĝo nur kompromitus la lingvon kaj ties tradicion.

Pro tio la Akademio de Esperanto konfirmas, ke la sola alfabeto de Esperanto estas tiu de la Fundamenta Gramatiko, al kiu aldoniĝas samloke jena rimarko: "Presejoj, kiuj ne posedas la literojn ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ ŭ povas anstataŭ ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u.

Prezidanto: W. Auld.

Sekretario: D-ro A. Goodheir.

(Gojigas nin diskonigi tiun ĉi deklaron al nia legantaro, kie ajn en la Esperanta mondo. Ĝi unufoje por ĉiam silentigu tiujn voĉojn, kiuj jelpas kaj blekas por tielnomataj "plibonigoj" en nia ortografio. - Red.)

+++++

Al ĉiuj membroj de SEA: Faru vian eblon varbi novajn adeptojn montrante al ne-esperantistoj la jenan anoncon anglalingvan, samtempe al ili klarigante iliajn informpetojn:

An Elementary Correspondence Course is available from the South African Esperanto Assn. at the low price of R10.00. Included in this are the Textbook, the Nixon Vocabulary and a Pronunciation Disc by Dr. J.C. Wells, and of course the correction of exercises and all-round advice for rapid advancement.

There is also available the Intermediate Correspondence Course with the necessary books at the same price of R10.00.

Further particulars may be obtained from the Treasurer, P.O. Box 1227, Cape Town.

+++++

Ordinare la Swakoprivero estas malprofunda, tute seka malaltaĵo en la sablo, ĉirkaŭ 200 metrojn larĝa, sed mi unue vidis ĝin kiel rapidfluantan riveron unu kilometron larĝa ĉe la buŝo.

Swakopmund situas sur la norda bordo de la rivero kaj por malebligi, ke domoj apud la bordo estu forportitaj en la maron, la enloĝantoj pasigas multon de sia libera tempo plenigante sablosakojn, kiuj estas stakitaj ĉirkaŭ la domoj por fortenti la akvon. Pro tio, ke la vojoj kaj fervojaj ligiloj al la landinterno kaj Walvis golfeto estis nevetureblaj dum la pasinta dusemajno, ne alvenis iu ajn poŝtaĵo aŭ vizitanto al Swakopmund dum ĉi tiu tempo kaj la komerca vivo de la urbo preskaŭ ĉesiĝis.

Ĉar manĝaĵa manko fakte ebligis, iom da maltrankvilo estiĝis kaj fumantoj ne plu reciproke proponis siajn cigaredojn. Do la enloĝantoj disponis pri multe da tempo plenigi sablosakojn kaj feliĉe la loka bierfarejo povis ankoraŭ daŭrigi fari sian bonegan produkton, kaj ĉakplenigantaj piknikoj sur la riverbordo tre populariĝis!

Malgraŭ ĉi tiuj antaŭzorgoj la rivero grade erodis la bordon kaj multaj sakoj englitis la akvon. Kvankam dua linio konstruiĝis pli proksime al la domo, post kelkaj tagoj ankaŭ tiu estis englutita kaj la malfeliĉaj domokupantoj devis evakui sian hejmon, kaj tute eble ankaŭ senpove alrigardi kiam kelkajn tagojn poste ĝi malrapide sinkis en la akvon. Multaj volontuloj helpis porti iliajn posedaĵojn al sekura loko. Nombro estis portempe enloĝigitaj kun amikoj aŭ en domoj ordinare malplenaj dum dek monatoj de la jaro.

Mallarĝa sablobreto formiĝis trans la riverbuŝo kaj kiam la akvo sufiĉe malleviĝis, kio iafoje okazis, grupo da Ovambaj portistoj, transvadante la riveron, kunportis pakaĵojn kiom ili povis. Kiam konatiĝis, ke varoj transiris la akvon, multaj amasiĝis por observi la portistojn. Kelkaj ja stumblis kaj enfalis la akvon sed iliaj kunportistoj ridegis kaj mokis, tamen la homamaso laŭte aplaudis. Iafaje oni sukcesis ekpreni pakaĵon antaŭ ol ĝi fordrivis, sed ofte unu-du malaperis, fine enirante la maron aŭ restante en la koto. Mi, bonŝance, rericevis mian valizon post semajno, sed dume devis aĉeti aliajn vestojn. La kofro entenanta la plimulton de miaj vestoj alvenis nur post tri semajnoj, kaj tiuj kun miaj libroj kaj gramofono, ktp., post pluaj ses semajnoj. Ĝis tiam oni riparigis la fervojponton trans la rivero. (al paĝo 10)

S-ro H.W. Appel naskiĝis la 4an de Oktobro 1912 en Amsterdamo. Enmigris Sudafrikon 1936a. Post mezlernejo studis konstru-tek-  
nikon kaj rilatajn temojn. Dum la mondmilito servis kiel arma  
inĝeniero en Indonezio. Revenis 1946. 1947/48 estris Neder-  
landan kompanion en Orienta Afriko.

Lernis Esp.on kiam 16-jara. Post unu jaro instruis E-on en  
Amsterdamo klubo porjunula. Gvidis kurson en Indonezio al kun-  
militkaptitoj. Aliĝis al Johannesburga Esp.o Soc.o en 1958.  
Estrarano de SEA ekde ĝia fondiĝo. Gvidis diversajn kursojn  
en la JHBA regiono. Verkis multe por periodaĵoj. Partoprenis  
seminarion por Cseh-metodaj instruistoj en Ateno dum la 6la UK  
en 1976. UEA delegito de + 1968. Membro de SALEI kaj ILEI.  
Antaŭ unu jaro peranto de Skolta Esp-o Ligo.

Regule korespondas mondvaste. Okupiĝas pri fremdaj lingvoj  
diversflanke, cele al kreskigi eksteran intereson pri E-o ĝene-  
rale, por efike kultivi kontaktojn kun ne-esperantistoj.

En la multflankeco de s-ro Appel troviĝas gimnastiko, savnaĝado,  
skermado, saltraĵdo, unua-helpo ĉe akcidentoj kaj flegscipovo,  
filozofio, graf-analizado, krom arda intereso pri ĉiuj facetoj  
de arkitekta laboro kaj scienco. \*\*

+++++++

PRI-ESPERANTAJ ARTIKOLOJ EN ĈINAJ GAZETOJ: 41 ĉinaj ĵurnaloj  
kaj gazetoj en 1979 kaj 25 ĝis la 10a de Majo de 1980 publikig-  
is artikolojn pri Esperanto kaj aktivecoj de Esperantaj Organi-  
zaĵoj en siaj lokoj. Krom tio, la Centra Radio kaj 7 radio-  
stacioj kaj televiziaj stacioj dissendis Esperanton aŭ disaŭ-  
digis esperantajjn kantojn.

La plej granda tagĵurnalo en Ĉinio publikigis artikolon de ĉina  
verkisto-Esperantisto, Cicio Mar, pri la 64a Universala Kongreso  
de Esperanto. La gazeto "Legado" publikigis artikolon pri la  
rusa blindá poeto Eroŝenko, kiu instruis Esperanton en Ĉinio en  
la dudekaj jaroj.

La 28an de Aprilo, Aŭstralia Esperantisto Errol Chick kaj lia  
edzino venis al Pekingo kiel membroj de vizitgrupo de la Aŭs-  
tralia-Ĉinia Amikeca Asocio. Ili kaj 4 Esperantistoj de Pek-  
ingo ekskursis en la pitoreska Somera Palaco.

En Aprilo inaŭguriĝis la foiro en Ghent, Belgio, kaj la ĉinaj  
envazaj miniatuuraj pejzaĝoj altiris al si multajn vizitantojn,  
kiujn precipe mirigis iuj herboj, arboj kaj florpantaĵoj  
vivantaj en vazoj jam 10, 50 aŭ eĉ 150 jarojn.

+++++++

Een van die opwindendste museums enige plek ter wêreld, die Goudmynmuseum van die Suid-Afrikaanse Kamer van Mynwese waarvoor daar so lank gewag is, is vanjaar in Junie deur die Staatspresident, mnr. Marais viljoen, geopen. Die museum, wat minder as 6 km van die Johannesburgse stadsaal af geleë is, sluit 'n volledige mynboudorpie met huise, winkels en werkwinkels in wat volgens die oorspronklike planne gebou, van meubels voorsien en ingerig is in die styl wat teen die eeuwending die mode was. Die terrein van 10 ha waarop die museum gehuisves word, word omring deur effens meer as 1 km spoorbane wat 0,6 km wyd is en besoekers sal in ouderwetse spoorwegwaens kan reis wat deur een of twee veteraanstoomlokomotiewe op 'n reis die verlede in getrek word.

Nog 'n aardigheid is die artistieke en kleurryke stamdanse van swart mynwerkers in tradisionele kostuums in die opelugstamdansarena met 2 500 sitplekke. Besoekers sal ook kan kyk hoe goud gesmelt en gegiet word, en as hulle tot die kern van sake wil deurdring, kan hulle van die geleentheid gebruik maak om die vyfde vlak van Crown Mines se nommer 14-skag sowat 220 meter onder die grond te besoek waar hulle 'n realistiese indruk sal kan kry van die mynwese van vergange se dae.

Unu el la plej ekscitaj muzeoj ie ajn en la mondo, la longatendita Sudafrika Ormineja Muzeo de la Ĉambro-de-Minejoj, estis malfermita la 6an de Junio ĉi-jare de la Statprezidento, s-ro Marais Viljoen.

Malpli ol 6 km distance de la Urbodomo, la muzeo inkluzivas kompletan, minejan vilagon kun loĝejoj, butikoj kaj laborejoj konstruitaj de originalaj planoj, meblitaj kaj ekipitaj en la laŭmoda stilo ĉe la jarcenta fino. La 10-hektara situo, kiu entenas la muzean komplekson, estas borderita per iom pli ol 1 km da fervojo de 0,6 m ŝpuro, kaj vizitantoj povos veturi en malnovstilaj relvagonoj trenataj de unu el du malnovpokaj vaporlokomotivoj sur vojaĝo en la pasintecon.

Plua regalo estos la artaj kaj kolorplenaj tribaj dancoj, kiujn faros nigraj minlaboristoj en tradicia kostumo en la 2,500 sidloka subĉiela dancareno. Al vizitantoj ankaŭ estas eble observi oron fandatan kaj verŝatan kaj, se ili posedas la guston esplori aferojn ĝisfunde, povos kapti la okazon por viziti la 5an nivelon de Crown Mines' No. 14 Sakto, ĉirkaŭ 220 metrojn sub la surfaco, kie ili povos



formi al si realisman impreson de mineja vivo kiel ĝi iam estis.

One of the most exciting museums anywhere in the world, the long-awaited South African Chamber of Mines Gold Mine Museum, was opened on June 5 this year by the State President, Mr. Marais Viljoen.

Less than 6 km from the Johannesburg City Hall, the museum includes a complete mining village with homes, shops and workshops built from original plans, furnished and equipped in the style that was in vogue at the turn of the century.

The 10 ha site which houses the museum complex is skirted by slightly more than 1 km of 0.6m gauge railroad track and visitors will be able to travel in old-style railway carriages pulled by one of two vintage steam locomotives on a journey into the past. An added treat will be the artistic and colourful tribal dances which black mineworkers will perform in traditional costume in the 2,500-seat open-air tribal dance arena. Visitors will also be able to see gold being smelted and poured and, if they have a taste for getting to the bottom of things, may take the opportunity to visit the 5th. level of Crown Mines No. 14 shaft, about 220 metres below the surface, where they will be able to form a realistic impression of mining life as it used to be.

+++++

LA MULO KAJ LA DI-STATUO.

La mulo portis di-statuon,  
kaj multaj fleksis la genuon.  
La best' imagis, ke l' honoro  
Koncernas ĝin, kaj pro ĉi gloro  
tia orgojlo ĝin infektis,  
ke dance, prance ĝi afektis,  
kaj sin skuadis, kapriolis,  
la ŝarĝon de si ĵeti volis.  
Bastonon prenis nun la mastro,  
tradraŝis ĝin kun kruda drasto,  
kaj kriis al ĝi por admono:  
"Vi estas, lernu per bastono,  
ne dio kaj nemortemulo,  
sed di-statuoporta mulo!"

+++++

- Ezopa Saĝo. Kalocsay.

EBRIETA: Pro ofendo Vicki Eulenstein devas sin pravigi. En Florida, ĉeporde de koktelejo, ŝi estis alparolinta sinjoron en uniformo: "Voku por mi taksion!" Indignite li respondis: "Mi ja ne estas pordisto. Mi estas admiralo!" Kaj Vicki: "Nu bone, tiam do ŝipon!"

MISKOMPRENO: Kiam laboristoj plibeligis la parkon "Heritage" en Guelph, Kanado, ili trovis amason da formetaĵoj: putrintajn blokojn de cedra ligno, malnovan generatoron, ŝnurojn, tendotolaĵojn farbŝmiritajn, aŭtorisortojn, ktp. Ĉion ili transportis al la rubaĵ-deponejo. Sed baldaŭ ekestis skandalo, ĉar artistoj ne plu trovis siajn skulpturajn ekspoziciaĵojn.

RUBAĴPOSTAĴOJ: 50 poŝtovicistoj de la japana urbo Osaka du tagojn trafosis rubaĵmonton. Ili serĉis poŝtarkon kun 1500 leteroj, kiun iu poŝtovicisto mallongan tempon lasis negardita sur la trotuaro, de kie ĝin erare kunprenis la rubaĵ-entrepreno. La plej grandan parton de la leteroj oni retrovis, estis poste asertite, sed necesas purigi la sendaĵojn antaŭ enmanigado.

IDEALA SINTENO: En volumena publikaĵo svisa eksperto pri enmigraĵaj problemoj priskribis la sintenon postulan de bona, edukita civitano. Interalie, li ne pendigu lavaĵojn en la fenestron, ne senokupe vagadu ĉirkaŭ la stacidomo, li uzu la strattransirejojn por piedirantoj, sur leteroj notu la korektajn poŝtajn kodnumerojn kaj - li ne ŝtelu pomojn!

VENTOKAPTILO: Dum diservo en malofte uzata kapelo apud Hellsburg, ventoblovo fermis la pezan pordon, kiu estis malfermebla nur de ekstere. Pastro kaj vizitantoj pro tio aŭdigis la sonorilojn por alvoki helpon. Hazarde pasantaj biciklistoj liberigis la enŝlositojn. En la vilaĝo oni miris pri la sonorigado, na taksante ĝin helpvoko.

#### ĈU "DEK" ESPERANTIST'

De paĝo 6: Tri monatojn poste la ĉiutaga vivado eknormaliĝis en Swakopmund, tamen post plua jaro multaj homoj ankoraŭ provis establi la sorton de siaj varoj aŭ paketaĵoj, enŝipigitaj aŭ entrainigitaj al la Teritorio dum la inundoj, kaj kiuj estis malaperintaj senpostsigne.

Esperanto-Ekspozicio trovis lokon en la enirhalo de la ĉefbiblioteko de la urbo, daŭrante de la dua ĝis la 22a de Septembro. Ĝi estis planita kaj efektivigita de Johan Hammes, nia plej juna membro, kun la helpo de s-ro A. von Blottnitz. Krom la grandaj vertikalaĵoj surfacoj, plenuzitaj por afiŝoj, prospektoj, flagoj, diversaj artikoloj, kovertoj, vidiĝis ankaŭ 12 vitrinoj plenaj de universitataj lernolibroj, religiaj verkoj, vortaroj, fakaj periodaĵoj, sciencaj libroj, sonbendoj, Esperanto-moneroj, poŝtmarkoj, pingloj, ktp., diversaj ĵurnaloj, kaj meze de la salono vitrino pri Afriko, verkoj de la sudafrikanoj de Kock, Woolf, Venter, Andrew, tri ĵurnal-kolektoj kaj la afrikans-lingva ŝlosilo de D-ro van de Merwe, kaj kelkaj flugfolioj kaj broŝuroj inkluzive de unu en la Svahila kaj "A Common Language for Africa". 25 personoj enskribiĝis, dezirante lerni aŭ almenaŭ pli profunde konatiĝi kun la fenomeno Esperanto. Kvarono de la adresoj venas el Soweto, io aparte interesa kaj bonvena.

Ĉe la hotelfaka lernejo en Braamfontein paroladis s-ro von Blottnitz, helpe de diapozitivoj kaj lumprojekciilo. La 65 aŭskultantoj (inkluzive lektorojn) montris grandan intereson, el kiuj 3 postulis instruadon.

Komence de Septembro ĉiujare ĉesas la universitataj kursoj, ĉar la studentoj devas dediĉi sin al siaj ĉeffakoj. Esperaŭto (la klubo ĉe Randse Afrikaanse Universiteit) havis Esp.ajn lecionojn ĉijare sume de 210 studenthoroj (88 lastjare). La unuan fojon en Sudafriko ano de Esperaŭto aliĝis al TEJO.

Per la Pasporta Servo Prof. Roger Saels el Belgio vizitis membron von Blottnitz dum kelkaj tagoj en Aŭgusto. Rezultiĝis valora interamikeco. Montrante al la gasto la ĉefurbon Pretoria ni ĝojis vidi la gajan surprizon kiam la profesoro kaj la tiea samideano van Hove eltrovis, ke ili dum la samaj jaroj studis ĉe la identa jaro antaŭ eble 40 jaroj!

A. von Blottnitz.

+++++

Tri mortintoj troviĝis ĉe la Perlaj Pordegoj. "Kiom da pekoj vi faris?" demandis Sankta Petro la unuan. "Nur unu", li respondis. "Paŝu unu fojon ĉirkaŭ la murojn de la ĉielo" ordonis Sta. Petro. "Kaj kiomfoje vi pekis" demandis tiu ĉi la duan. "Du fojojn" li respondis. "Do, du foje vi ĉirkaŭpromeni la murojn. Sed kie estas la tria ulo" demandis Sta. Petro, "Ĉu vi ne estis tri?" "Jes, ni ja estis tri", diris la alia, "sed la tria rerapidis hejmen por preni sian biciklon". \* El la ebra tradukis J.E. Williams, Johannesburgo.

Nia sekretario, s-ro O. Sher skribas, ke li ĝuste nun okupiĝas legi la Originalan Verkaron de Zamenhof (kompilitan de D-ro Joh. Dietterle, 1929), prenitan el la JHBa biblioteko. La libro iam apartenis al iu D-ro C. Pridmore Andrew de Johannesburgo.

Diras s-ro Sher: "Sur paĝo 79, citaĵo No. 27, ĉerpita el "La Esperantisto" de 1890a jaro, mi trovis la jenan:

"Al s-ro C. en Cape Town (Suda Afriko) - Per poŝta karto mi siatempe respondis al vi je via letero, sed post kelka tempo la poŝto redonis al mi la karton kun la surskribo, ke por via lando poŝtaj kartoj ne estas akceptataj. Tiam mi sendis al vi jam leteron kovritan kaj mi petas vin sciigi min, ĉu vi ĝin ricevis".

Ĉu iu scias, aŭ povas iel informiĝi, kiuj estis D-ro Pridmore Andrew kaj la s-ro C. al kiu D-ro Zamenhof Skribis? Sciante estas, ke iu s-ro S.A. Andrew, kiu i.a. esperantigis "Story of an African Farm - O. Schreiner) asekura agentestro, havis la adreson de P.O. Box 199, Johannesburg, en la jaro 1927. Nia redaktoro konatiĝis kun li en la 1946a en Kaburbo. Tute eble li parenco estis de Pridmore Andrew. Tre penvalorus, se niaj nordaj membroj decidiĝus inter si kiel procedi por malkovri iajn informojn de eblaj posteuloj de s-ro S.A. Andrew, por provi trovi iun ligilon, se tiu ekzistas, kun la nomita Pridmore Andrew.

++++++

RECENZO: De la Norvega Esperanto-Ligo, Boks 942, Oslo 1, ni ricevis ekzempleron de bela, informriĉa broŝuro "Rigardo al Norvegujo", verkita (en la norvega) de Erling Udle-Strand, kaj tradukita de C. Støp-Bowitz. Ĝin eldonis la norvega Reĝa Ministerio por Eksteraj Aferoj. Per tio la Ministerio la unuan fojon oficiale uzas Esperanton en siaj presaĵoj. La presaĵo estas senpage havebla, kaj petojn oni povas direkti al la ĉi-supra adreso, kie oni tradukos kaj transsendos al la Ministerio por ekspedo.

Petante la broŝuron vi duoble servos al nia afero. Unue vi havos broŝuron por montri, ke registaroj ja uzas nian lingvon, kaj due, la Ministerio mem vidos, ke utilas uzi nian lingvon.

O. Sher.

Sur ĉi tiu nia planedo elĉerpiĝadas energio - nu, ne vere energio kiel tia, sed ja energio en formo, kiun ni povas oportune utiligi. Iam petrolo estis pli ol abunda. Antaŭ ol ni komencis ĝin uzi kiel energirimedon, ĝi estis eĉ troa. Sed tiu tempo por ĉiam pasis. La petrolo, kiu estis facile trovebla, estas jam trovita, jam prenita, jam uzita, jam for.

Ĉu necesas menci la 'solvon', kiun prezentas la nuklea energio? La konsento estas preskaŭ universala, ke almenaŭ en sia nuna tempo la nuklea energio ne estas kontentiga kiel konstanta solvo. Akcepti ĝin eĉ kiel provizoran solvon estus troa risko al la sekura pluvivo de la homaro.

Se oportune utiligeblaj energirimedoj efektive fariĝos ĉiam pli maloftaj, ni povos antaŭvidi ĉiam pli fortajn internaciajn streĉojn pri la posedo de la malmulto, kiu restas. Lige al tio, la progreso de la nuklea teknologio jam de longe grandigis la rondon de ŝtatoj, kiuj posedas atomarmilojn.

Bonŝance ni posedas unu nuklean reaktoron, kiu estas sufiĉe for de la loĝata tereno, meze je 150 milionoj da kilometroj. Ni nomas ĝin la suno. Sed ekzistas problemoj pri la ekspluatado de sunenergio. Ĝi malfortigas per filtriĝo tra la atmosfero. Kaj kvankam la sunenergio varmigas la teron dum ĉiu sekundo de ĉiu tago, tiu varmo fariĝas apenaŭ uzebla krom kiel varmo mem dum tiu parto de la tago, kiun ni nomas nokto.

Unu solvo al ĉi tiuj problemoj estus la konstruado de satelitoj kiuj akceptus la sunenergion kaj konvertus ĝin al mikroondaj radioj, kiuj pli bone kapablas penetri la atmosferon por plia konvertiĝo al elektro aŭ alia uzebla energiformo. La satelitoj estus en tia orbito ke, unue, ili restus super unu loko sur la tersurfaco, kie estus la ekipaĵo por ricevi kaj konverti la mikroondojn; due, ĝi povus fronti la sunon konstante, eĉ kiam la riceva ekipaĵo estus en nokto.

Ĉi tiu plano estas multe esplorata, ĉefe en Usono, kvankam sen granda registara subteno ĝis nun. La plano dependas, i.a., de la uzo de lunaj aŭ asteroidaj materialoj por konstrui la satelitojn, ĉar estus tro multekoste enorbitigi la materialojn de sur la tero, kun ties relative forta gravito.

+++++

- La Juna Penso.

La membroj kaj Estraro de SEA (kondolencas) kun s-ro Tom Shofner pri la morto en Parizo, Tennessee, Usono, de lia patrino, en la 3a de Novembro, 1980.

+++++

Estimataj (kaj espereblaj) kunlaborantoj,  
Dum la lastaj jaroj oni ofte diris, ke la disvastigo de Esperanto iel similas al tiu de la telefono. Bone, estas io vera en ĉi tiu diro. Ju pli granda kaj densa estas la telefonreto, des pli utila estas ĉiu unuopa telefonaparato. Ĉiu individua Esperanto-lernanto pligrandigas la tutmondan retaron de Esperantistoj kaj la eblan universalan utiligon de la lingvo.

Sed - la grandeco de la telefonreto per si mem ne utilas; por povi praktike utiligi ĝin oni bezonas t e l e f o n - l i b r o n. Simile estas pri Esperanto: oni bezonas a d r e s a r o n por povi praktike utiligi ĝin. Ju pli ampleksa la adresaro, des pli utila Esperanto kaj - des pli granda la a l l o g a f o r t o de Esperanto inter la publiko.

Vi ĉiuj bone komprenas tiun ĉi fakton, alie vi ne estus resendintaj la TEA-respondilon. Ni ĝojas pri via kunhelpemo, pro la kunlaboremo de gravaj institucioj kiel, i.a., Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds, la Esperanto-Centro, (Paderborn), La Internacia Kultura Servo en Zagreb (Jugoslavia), ktp.

Al la kluboj, asocioj kaj societoj kaj grupoj ni demandas ke vi faru la saman. Se vi eldonas propran organon, ni petas, ke vi tiel bonvolos diskonigi la enhavon de tiu ĉi cirkulero. Ni volonte sendos al vi la bezonatan kvanton de respondiloj, tute senkoste.

Info-Servo intencas aperigi la unuaneldonon de TEA iam dum la unuaj monatoj de la venonta jaro. Ni esperas, ke jam tiu unua eldono estos ampleksa, vere tutmonda adresaro.

Kun koraj salutoj,  
via, Helmut Welger.

+++++

"Paŭlo, kial do via adicio estas ĉiam erara? Ĉu vi sola faras viajn hejmtaskojn, aŭ ĉu iu helpas al vi"? "Jes, mia patro helpas al mi". "Sed diru al mi, kia estas lia profesio"? "Li estas kelnero, sinjoro instruisto".

"Mia edzino, post la apendic-operacio, perdis dek kvin kilogramojn de sia korpopezo". "Mirinde, tre mirinde", ekkrias lia amiko, "Mi tute ne sciis, ke tiu apendico pezas tiom multe ... !"

+++++

Korespondado estas por komencantoj la plej bona praktikado de la lingvo. Pri tio apenaŭ estas dubo. Komencanto, kiu ekhavis interesan korespondadon kaj tiel akiris alilandajn amikojn, probable restos Esperantisto. Sed kiel trovi konvenajn korespondantojn?

Ciu Esperantisto, kies adreso troviĝas en periodaĵo riskas ricevi - efektive senĉese - proponojn de komencantoj diverslandaj. Sajnas, ke kursgvidantoj tute senĝene donas hazarde trovitajn adresojn al siaj senkulpaj kursanoj. Precipe la delegitoj de UEA estas multe ĝenataj de tiaj petoj, sed tio estas misuzo de, kaj ne apartenas al la taskoj de delegitoj. Same, landaj Esperanto-asocioj, komitatanoj kaj eĉ la Prezidento de UEA, akademianoj, ktp., ne malofte ricevas tiajn proponojn. "Mi lernas Esperanton en kurso kaj mia kursgvidanto donis al mi vian adreson". "Mi tre interesiĝas pri via bela lando kaj deziras interŝanĝi belajn bildkartojn kaj poŝtmarkojn". "Ĉu vi volas korespondi kun mi? Mi senpacience atendas vian baldaŭan respondon"; aŭ: "Mi trovis vian adreson en la jarlibro de UEA ...", ktp.

La fenomeno prenis tiajn dimensiojn, ke kelkloke oni devis pretigi multobligitan rifuzan respondleteron. Oni devas ne seniluziigi komencanton, tial li ricevu almenaŭ respondon, eĉ se rifuzan.

Devas esti eble iel instrui al niaj fervoraj kursgvidantoj, ke la gvidantoj de la movado havas aliajn taskojn, ol korespondadi kun komencantoj, kaj ke korespondantojn oni serĉas en la koncernaj anoncetoj en la Esperanto-revuoj, aŭ oni mem publikigas sian anonceton.

Troviĝas homoj, kiuj rifuzas fariĝi fakdelegitoj, ne ĉar ili ne estas pretaj fari normalajn delegit-servojn, sed ĉar ili ne volas riski ricevadi la senĉesajn "sovaĝajn" korespondopetojn, kiuj kun absoluta certeco venus, se iliaj adresoj troviĝus en la Jarlibro.

- C. Støp-Bowitz.

+++++

Ni plaĉas pli ofte en la societaj interrilatoj per niaj malbonaj kvalitoj, ol per niaj bonaj.

Nia pento estas ne tiel bedaŭro pri la malbono, kiun ni faris, kiel timo antaŭ tiu, kiu povas al ni okazi pro ĝi.

Estas herooj pri malbono, kiel pri bono.

- La Rochefoucauld.

Pri ONIN kaj ONIA: Akuzativo kaj pronomo poseda de la vorto ONI estas per si mem formoj tute regulaj, kaj ĉiu havas plenan rajton uzi ilin, ĉar nenie en la Fundamento estas dirite, ke ONI prezentas escepton el ĉiuj aliaj analogiaj pronomoj. Nur en la p r a k t i k o oni ĝis nun ne uzadis la formojn ONIN kaj ONIA, ĉar preskaŭ en ĉiuj plej gravaj lingvoj la vorto ONI ne ŝanĝiĝas kaj la akuzativigo kaj adjektivigo de tiu ĉi vorto sonus tre strange en la oreloj de la plimulto de la Esperantistoj. Sed en Esperanto la "nekutimeco" ne prezentas gravan kaŭzon por neuzado; tial, kvankam mi persone ĉiam evitas la diritajn formojn tamen, se iu ilin uzus, mi neniel povus vidi en tio ĉi ian pekon kontraŭ la reguloj aŭ kontraŭ la komuna spirito de nia lingvo.

Pri la futura participo: La esprimo "mi estas feliĉa, akceptonte vin" estas bona, kvankam mi preferus diri pli simple "mi estas feliĉa, ke mi vin akceptos". La frazo "mi inklinas ne faronte tion" ne ŝajnas al mi bona; mi dirus: "mi estas inklina ne fari tion".

Pri MULTE DA kaj MULTA: La formoj "multe da laboro" kaj "multa laboro" teorie estas egale bonaj. Sed estas diferenco inter "multaj homoj" kaj "multe da homoj"; "multaj homoj" = diversaj homoj (ĉiu aparte); "multe da homoj" = granda nombro da homoj (kune).

- El "Lingvaj Respondoj" de D-ro Zamenhof.

+++++

Ni havas la plezuron avizi niajn legantojn, ke tiu ĉi eldono de BE tute eble estos la plej lasta produktita multobligite. De nun ni elirigos nian revuon per la ofseta metodo, kiu liveros pli bonaspektan kaj pli facile manipuleblan kaj legeblan legaĵon.

Ni tre bedaŭras trompi la esperojn de tiuj, kiuj, kiel ni mem, atendis la aperon jam per tiu ĉi numero, sed ni ne sukcesis fari la finajn aranĝojn ĝustatempe. - Red.

+++++